

Intervjuo pri Internacia Feria Altlernejo kun ties kursestro, Giorgio Silfer

Radioprelego de Claude GACOND, SRI-841/325, 1979 novembro 22 kaj 24

http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-49-/Radioprelego_841_SRI_325_1979_11_22_24_Intervjuo_pri_Internacia_Feria_Altlernejo_kun_ties_kursestro_Giorgio_Silfer.mp3

Cl.- Ĉi tie Svisa Radio Internacia. Vi hodiaŭ aŭdas Claude Gacond, kiu intervjuas s-ron Giorgio Silfer pri Internacia Feria Altlernejo (IFA).

Sinjoro Silfer, dum unu jaro vi multe laboris por Internacia Feria Altlernejo kaj tutcerte la sukceso de la IFA somera sesio 1979a estas rezulto pozitiva de tiu laborego. Ĉu vi povas iomete paroli al ni pri tiu sesio kaj pri tiu ĉi laboro ?

GS.- Ĝi estis la dua oficiala sesio de IFA, kvankam ekzistis ankaŭ antaŭaj sesioj kun nur unu aŭ du kursoj, eksperimentaj sesioj. Ni baziĝis sur la tiamaj spertoj kaj ni lanĉis ĉi-jare la plej grandan sesion ĝis nun kun praktike dek-kvino da aranĝoj. Se mi nombras ĉiujn, do: semajnajn kursojn, seminariojn semajnfinaĵojn, la fakan kolokvon pri la porinfana literaturo per kiu oni inaŭguris la sesion la 2an de junio. La ĉefaj atingoj laŭ mi estas la diskoniĝo de IFA je internacia nivelo, la partopreno de homoj ĉiam pli junaj. La meza aĝo malaltiĝis, draste malaltiĝis ĉi-jare. Ĝis tioma grado ke venontjare ni devas nepre pristudi la ekfunkciigon de la infanĝardeno.

Cl.- Jes, ĉar gepatroj venas kun infanoj, ĉu ne?

GS.- Jes, kaj ĝuste nia celo estas ke ne venu nur fraŭloj kaj emerituloj, sed ke venu homoj el ĉiu aĝo.

Cl.- Do, el la kursoj okazintaj ni eble citu nun unue la titolojn.

GS.- Ni povas mencii ekzemple la tre sukcesan kurson de Claude Piron pri 'Kiel influas la psikon la eduko de infano?', sed ankaŭ mi volus mencii la du tre sukcesajn kursojn en aŭgusto de Jouko Lindsted pri 'Enkonduko al ĝenerala lingvistiko' kaj de Claude Gacond pri la aŭdvida kaj pergesta instruado. Cetere estis tre sukcesaj ankaŭ ĉiuj kursoj 'B'-nivelaĵoj, tio estas la mezaj kursoj, kie instruis Perla Martinelli,

Cl.- kaj vi mem

GS.- kaj mi mem, jes, instruis en unu el ili.

Cl.- Kiel estas laŭ vi la estonteco de tiu ĉi provo kaj ankaŭ kiuj estas la problemoj, kiujn ĝi laŭ vi alfrontas?

GS.- Do, mi estas optimisma pri la estonteco, sed mi ne kaŝas al mi mem la problemon. Kial mi estas optimisma? Mi estas optimisma, ĉar efektive ekzistas la neceso havi tian internacian altlernejon, ni diru kun post-abiturienta nivelo, kie oni povu lerni diversajn studobjektojn per esperanto kaj samtempe oni povu profundigi siajn esperantologiajn konojn. Ekzistis diversaj projektoj, kiuj ankaŭ realiĝis sukcese, sed ili ne povas plene kontentigi la merkaton ni diru ĉar ekzemple Greziljono estas geografie tro fora, SUK en Lieĝo ne sufiĉe konstanta kaj iom tro limigita al sciencaj branĉoj, ISU okazas nur dum unu semajno de la jaro, eble ne sufiĉe alta estas la nivelo de la kursoj en Primoŝteno, kaj ĉion ĉi ni klopodas eviti danke al la situigo de

IFA en La Chaux-de-Fonds, de tiu ĉi unua privata altlernejo en esperanto. Aliflanke la problemoj ekzistas, unuavice estas problemo, mi kredas, de integriĝo de tiu ĉi privata altlernejo en la svisa kunteksto. Per tio mi celas ne nur la integriĝon en la kuntekston lernejon svisan, sed ankaŭ la integriĝon en la kuntekston esperantistan. Oni bezonas havi pli vastan partoprenon de svisoj, unuavice de romandoj, sed ankaŭ el aliaj partoj de Svislando por ne riski krei katedralon en la dezerto, al kiu venas la pilgrimantoj, ĉu ne, el la diversaj landoj najbaraj kaj pli foraj, sed ne venas la svisoj mem, kiuj devus eble havi iomete pli da humileco kaj decidi ke tamen estas io ankoraŭ por lerni krom tio kion ili jam konas. Alia problemo estas la fakto ke ni kutime pagas kaj bone pagas niajn docentojn. Sed ĝuste pro nia politika decido ke la docentoj ricevu bonan pagon por ke ili donu profesinivelan kurson, ni restas kun minimumaj marĝenoj financaj. Ekzemple mi mem donis ĉi-jare meznombro du horojn ĉiutage kaj tion mi faris tute senpage. Kompreneble oni ne povas eterne elteni tion. Kaj tio ĝuste estas la demando, ĉu ni sukcesas venki la veton pli frue ol la kursestro mem kreas. Do tiuj estas kelkaj el la problemoj, kiuj estas sur la tapiŝo kaj estas la normalaj problemoj finfine de kreskado fazo. Pro tio mi revenas al mia komenca optimismo. Ĉiuj problemoj dependas de la kresko kaj ne de stagnado aŭ simile.

Cl.- Kaj rilate al la profesoroj, instruantoj, ĉu ne, estas ankaŭ ne tiom facile trovi profesorojn kapablajn gvidi kursojn, ni diru ne universitat-nivelaj sed altlernej-nivelaj.

GS.- Jes, estas malfacile unuavice trovi la homojn, el kiuj konvinkiĝas ke esperanto ne estas bagatela afero kaj do, ke la kursoj de IFA estas kursoj seriozaj. Mi havis sperton dum ĉim tiu sesio kun unu instruisto el Italio, al kiu por ke li komprenu bone pri kio temas mi diris : ne kredu ke tiu ĉi altlernejo estas je la sama nivelo de la kursoj, kiujn vi donas en Italio. Ĉar tiu ĉi altlernejo estas multe pli serioza ol itala universitato. Ĉar estas facile esti pli serioza ol itala ŝtata universitato nuntempe, sed evidente, tiu homo havis specifan koncepton pri esperanto kaj tre multaj estas ligitaj al tiu koncepto ke per esperanto oni povas turismi, oni povas eterne galdi la samajn regulecojn gramatikajn kaj babili denove daŭre pri esperanto, sed fari sciencajn esplorojn aŭ humanisman esploron pere de esperanto, do krei tutan aron da eblecoj por kulturiĝo en plej vasta senco kaj en internacia perspektivo, tio estas afero al kiu la tuta esperanta popolo bezonas maturiĝi, inkluzive de la eventualaj docentoj.

Cl.- Kaj tiuj ĉi docentoj, kiujn kvalifikaĵojn, nivelojn ili devas havi, kie ili devas loĝi, laŭ vi por ke tio bone funkcii ?

GS.- Do, laŭ mia kompreno, en la ideala modelo de docento de IFA ne tiom gravas, kie li loĝas, kiom gravas ke li havu fakan preparon pri specifa temo apud profunda esperantologia preparo. Kaj krome, ke ĝuste per tiu profunda esperantologia preparo la docento alvenas al la ideo, ke oni povas aliri kelkajn fakojn aŭ ĉiujn fakojn de la homa scio multe pli detale, se vi volas, multe pli trafe, multe pli internacie danke al esperanto ol pere de alia lingvo.

Cl.- Vi aŭdis intervjuon pri IFA, tio estas, pri Internacia Fiera Altlernejo, kiun realigis por Svisa Radio Internacia Claude Gacond kun Giorgio Silber, la kursestro de IFA. Ĝis reaŭdo!